

M. 15151:1.

(översätt. 2 sidor)
+ 1 broschyr

Tyskland

uppt. år 1952

Ivan i LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.
s. 1.

Al la Universitato de Lund, München, 9.IV. 1952
Etnologia Arkivo
Finngatan 8
Lund, Svedujo

Respondoj al la demandoj en "Heroldo de Esperanto" n-ro 1158.

1-a Demando.

Jam en la Malnova Testamento de la Sankta Skribo estas skribita, ke la homoj ne manĝu la viandon de unu-hufuloj, kiel de ĉevaloj, azenoj ktp. En la tempo, kiam la viando estis racionita, multaj satantoj de viando acetis ĉeval-viandon, kaj en mia logejo mi povis observi, ke tiaj homoj estas tre malbonhumoraj kaj kverelemaj, malpacaj, krom tio ili aspektas malsanaj, nefreŝaj, apatiaj, kaj la vizagoj fariĝis pli kaj pli flavaĵaj. Tiun flavan koloron oni povis konstati ankaŭ ĉe aliaj ĉevalaj-mangantoj. (La ĉeval-buĉisto havas sian butikon vid-al-vide de mia logdomo). Mi ĉiufoje naŭze flaris la malbon-odoron, kiam oni kuiris ĉeval-viandon. Pro la preskaŭ epidemia flav-malsano la homoj ĉesis iam post iam mangition. Nun la ĉevalaĵo estas uzata por la 40 000 hundoj, kiuj ekzistas en nia hundama urbo. Mi mem neniam mangis tian viandon, kaj mi aspektas tre sana, estas ruĝvanga kaj ĉiuj konatoj alparolas min pro mia freŝa vizago, kvankam mi estas jam 61-jara. — De ĉevalo mi nur en junaĝo mangis la fumitan langon, ĝi estas bongusta frandaĵo.

2-a Demando.

Dio diris al Adamo, ke li regu sur la Tero; ĉio, bestoj kaj plantoj, ĉiuj produktoj servu al la homo. Do la mortigado de ĉevalo, hundo kaj kato ne kaŭzas socialan malhonoron. Malsanej, suferantaj bestoj eĉ sopiras esti mortigataj, kontentaj ili subigis al buĉado. Pri traktado de dombestoj Kristo diris, ke oni zorgu kaj nutru ilin kiel necesas por ilia vivo, sed oni ne tro dorlotu ilin. (Okaze de lia vizito ĉe la Tri Sagaj Reĝoj dum la retiriĝo post la revivigo de Lazaro; unu el la Reĝoj estis jam mortinta.) Tie oni montris al Jezuo krom la fabele ornamita, or- kaj juvel-brila preĝejo kaj kvazaŭ paradizaj ĝardenoj ankaŭ la best-azilon, kie hundoj kaj katoj kuŝis en luksaj, blankaj, molaĵ litoj kaj estidorlote flegataj. Tiu-okaze estu menciata, ke ankaŭ Munĥeno havas sian best-azilon en apuda antaŭloko subtenata de la Best-ŝirma Unuiĝo. Temas pri dombestoj, kiujn la posedintoj ne plu povas nutri aŭ gardi.

3-a Demando.

Jes, ekzistas specialaj personoj, kiuj havas la taskon mortigi hundojn kaj katojn; por grandaj bestoj nia urbo havas modernan buĉejon kun multaj veterinaroj. La hund-mortigantoj oni nomas "Schinder" tio signifas senhutigiston, senfeligiston, ekspluatiston de kadavroj. Tio estas la popola esprimo. La skriba esprimo estas "Abdecker" = senfeligisto. Estas lege ne permesata enterigi hundojn, oni devas transdoni la kadavrojn al la senfeligisto. Li ekspluatas ĉion uzeblan. De hundoj oni satas precipe la grason, ĝi estas vendata en apotekoj kiel kuracilo por pulm-malsanuloj. La profesio de senfeligisto estas ŝtate agnoskata.

4-a Demando.

La buĉado devas okazi kiel eble plej rapide, sed la plej multaj best-posedantoj transportas siajn kadukajn karulojn en la veterinar-lernejon por daŭra dormo. Ili eĉ atendas, ĝis la besto mortis, por esti certa, ke ĝi ne estas uzata por kurac-provaj eksperimentoj.

Mi kunsendas Esperanto-cirkuleron kun la peto rekomendi ĝin.

Samideane salutas Maria Schöttl

Maria Schöttl

⑧

Svar på frågorna i HEROLDO DE ESPERANTO nr 1158.Fråga 1.

Redan i Nya Testamentet i den Heliga Skrift står skrivet att människorna ej må äta köttet från hovdjur, såsom hästar, åsnor osv. På den tiden då köttet var ransonerat var det många köttälskare som köpte hästkött, och i mitt hus har jag kunnat lägga märke till att sådana människor är mycket grälsjuka, är ofta på dåligt humör och blir gär osams. Dessutom ser de sjuka ut, torra och apatiska, och ansiktena gulnar mer och mer. Denna gula färg har man kunna konstatera även hos andra hästköttätare. (Hästslaktar har sin butik mitt emot mitt hus.) Jag har alltid med äck känt den dåliga lukten när man stekt hästkött. På grund av den nästan epidemiska gulsoten har folk småningom upphört att äta sådant. Nu användes hästköttet för de 40.000 hur som finns i vår hundälskande stad. Självt har jag aldrig ätit sådant kött, och jag ser mycket frisk ut, är rödkind och alla bekanta påtalar mintfräscha hy, fastän jag redan är 61 år. -- Endast i min ungdom åt jag av häst den rökte tungan. Den är en fin läckerhet.

Fråga 2.

Gud sade till Adam att han skulle råda över jorden. Allt, djur och växter, alla produkter skall tjäna människan. Dödandet av häst, hund eller katt förorsakar alltså ingen social vanheder. Sjuka, lidande djur längtar till och med efter att få bli dödade, nöjda undergår de slaktingen. Angående husdjurs behandling sade Kristus, att man skulle sörja för dem och föda dem efter deras livsbehov, men man skulle inte klema bort dem alltför-mycket. (Vid tiden för hans besök hos de tre visa konungarna, då han dragit sig tillbaka efter Lazarus' uppståndelse; en av konungarna hade redan dött.) Där visade man för Jesus, förutom det sagolikt smyckade guld- och juvelprydda templet, och de paradislignande trädgårdarna, även djurasylen, där hundar och katter låg i luxuösa, vita, mjuka sängar och vårdades med största omsorg. Här må nämnas att även München har sin djurasyl i en intilliggande förort vilken underhålles av Djurskyddsföreningen. Där är det fråga om husdjur som ej vidare kan få mat och passning av ägarna.

Fråga 3.

Ja, det finns särskilda personer, vilka har till uppgift att döda hundar och katter. För större djur har vår stad ett modernt slakthus med många veterinärer. Den som dödar hundar kallar man "Schinder" vilket betyder en som flår, tar vara på hundkropparna. Detta är den populära benämningen. Det uttryck man använder i skrift är "Abdecker" = pälavtagare. Det är enligt lag ej tillåtet att begrava hunder man måste överlämna kropparna åt "pälavtagaren". Han tar vara på allt användbart. Hundarnas fett är särskilt uppskattat, det säljes i apoteken såsom botemedel för lungsjuka. Yrket "pälavtagare" är officiellt erkänt av state

M. 15151.

Fråga 4.


Slaktningen måste äga rum så fort som möjligt, men de flesta djurägarna skicker sina bräckliga älsklingar till veterinärskolan för varaktig sömn. De väntar till och med till dess djuret dött, för att vara säkra på att det inte användes för experiment med läkemedelsprover.

Jag närsluter ett cirkulär på esperanto och ber Eder rekommendera det.

Med hälsningar

MARIA SCHÖTTL

LEK/TB



La Ĝusta Vojo

Internacia Cirkulero por Katolikaj Esperantistoj

Numero 51

MARTO 1952

Aperas monate (Lič. 1327)

Duonjara abono: 3.—M. por eksterlando: 10 resp.-kup. aŭ —.75 dolaro, kafo, sukeraĵo aŭ io ajn, sed ne legaĵo.

Redakcio kaj admin. MARIA SCHÖTTL (13b) MÜNCHEN 19, SCHULSTRASSE 26/J. Postĉekk. 57880 München (Maria Schöttl) Germanio.

Legajo el la Libro de Saĝeco. (7, 7-14).

Mi petis, kaj estis donita al mi kompreno; mi vokis, kaj la Spirito de Saĝeco venis al mi. Mi pli ŝatis la Saĝecon ol reĝolandoj kaj tronoj, kaj mi taksis riĉecon kiel nenion kompare al ĝi. Neniam juvelŝtonon mi egalas kun ĝi; ĉar ĉiu oro estis apud ĝi nur iomete da sablo, kaj arĝento kompare al ĝi estas taksata kiel argilo. Pli ol saneco kaj beleco mi ŝatis ĝin, kaj mi ĝin preferis al la lumo de l' tago; ĉar ne-estingebla estas ĝia brilo. Sed venis al mi ĉiuj aliaj bonaĵoj samtempe kun ĝi kaj nemezurebla riĉaĵo per ĝiaj manoj. Kaj mi ĝojis pri ĉi ĉio, ĉar la saĝeco gvidis min. Sed iam mi ankoraŭ ne sciis, ke ĝi ja estas la kreinto de tiuj bonaĵoj. Sen falso mi ĝin lernis, kaj sen envio mi ĝin sciigas, kaj mi ne tenas sekrete ĝian valoron. Ĉar ĝi estas ne-elĉerpebla trezoro por la homoj. Tiuj, kiuj ĝin aplikas, partoprenas je la amikeco de Dio, ĉar ili sin rekomendas al Li per la donoj, kiujn la virtoj havigas.

Evangelio laŭ Mateo. (22, 34-46). En tiu tempo venis la farizeoj al Jezuo. Unu el ili, legisto, volis tenti lin kaj demandis lin: Majstro, kiu estas la plej granda ordono en la leĝo? Jezuo respondis al li: Vi amu la Sinjoron, vian Dion, per via tuta koro, per via tuta animo kaj per via tuta intelekto. Tiu ĉi estas la plej granda kaj unua ordono. Kaj la dua estas simila al ĝi: Vi amu vian proksimulon kiel vin mem. De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj. Kaj kiam la farizeoj estis kunvenintaj, Jezuo ilin demandis: Kiel ŝajnas al vi pri la Kristo? Kies filo li estas? Li respondis al li: La filo de David. Li diris al ili: Kial do David, lumigita de la Spirito, lin nomas Sinjoro? Li ja diris: La Sinjoro diris al mia Sinjoro: Sidu dekstre de Mi, ĝis Mi metos viajn malamikojn kiel benketon sub viajn piedojn? Se do David nomas lin Sinjoro, kiamaniere li estas lia filo? Kaj neniu povis ion respondi al li, nek iu ekde tiu tago kuraĝis demandi lin plu.

La Amo. La amo estas pacienca, afabla. La amo ne envias, ne fanfaronas kaj ne fieracas; ĝi ne estas aroga, ne egoista; ĝi pro aliaj ne amariĝas, ĝi ne venĝas la malbonon; ĝi ne ĝojas pri maljustaĵo, sed ĝojas pri la vero; ĝi portas ĉion, kredas ĉion, esperas ĉion, toleras ĉion.

En kriza tempo de W. Mudrak.

Ni krizoplenan mond-situan vidas, sed malgraŭ tio konvinkite fidas, ĉar al la estontec' kaŝita gvidas nin Dio la Savinto firma-mane! Ho, ke ni vivu, agu nur kristane! Neniam fidas, kredas ni do vane!

Dairigo de la preĝo de Papo Pio

XII. 3. Ni fidas al tio, ke vi, Maria, plena de mizerikordo malsuprenrigardas al niaj mizeroj kaj niaj timoj, al niaj bataloj kaj niaj malfortoj; ke vi kun ni ĝojas en niaj ĝojoj kaj niaj venkoj, kaj ke vi aŭdas la voĉon de Jezuo, kiu al vi diras pri ĉiu el ni, kiel li iam pri sia amata disĉiplo diris: Jen, via infano. Kaj ni, kiuj vin alvokas kiel nian patronon, ni vin faras, kiel iam Johano, je nia gvidantino, forto kaj konsolantino en nia surtera vivo.

Pri la kristana vivo.

Nia respondeco en la publika vivo.

La plej multaj germanoj timas partopreni en politikaj aferoj, ĉar „bruldifektita infano timas la fajron“. Dum la terura naci-reĝimo estis kondamnitaj la kuraĝaj kristanoj, kiuj riskis protesti kontraŭ ĝi. Ankaŭ la komunistoj suferis kaj mortis en koncentrejoj, ĉar iliaj ideoj estis iomete aliaj ol tiuj de la tirano Hitler. Post militfino estis la vico de naciistoj, kiu estis akuzita, kaj tre ofte tiuj, kiuj en koro ne konsentis al tiu tirana reĝimo, sed tamen aniĝis en la naciista partio, estis pleje punataj. — Sed nun oni devas forviŝi, kion oni suferis kaj perdis kaj ne lasi kuŝi la tutan haoson, mizeron kaj malpacon, aŭ pensi: tion ordu aliaj, sed ne mi. — Spite al la amara seniluziigo ni klopodu konstrui novan ekzistencan. Se ni kristanoj nun ne kunlaboras en la publika vivo, tiam ni estos traktataj de la aliaj laŭ ties plaĉo; tiam ni devos fari tion, kion iuj ajn fanatikuloj elkovas je niaj kostoj kaj je sia avantaĝo, kaj ni ree perdos ĉion. De ni dependas nia estonta ŝtat-gvidado, ĉar en la demokratio ni havas la eblecon, sciigi nian opinion en publikaj aferoj, ekz. kiujn impostojn ni pagu kaj kiujn ni rifuzu; ĉu la rajtoj de la gepatroj estu ŝirmataj; en ĉiuj aferoj kulturaj, socialaj kaj ekonomiaj ni povas mem decidi. — Do el nia medio sin disponigu respondeco-ĝojaj, honestaj viroj kaj virinoj por la laboro en la magistratoj aŭ en pli altaj politikaj gremioj kaj oficialaj organizaĵoj. Oni ne estu indiferenta pri la aferoj en la ŝtata vivo. Papo Pio XII. prave vokas al ni: „Ne

plendi, sed agi, estas la ordono en la nuna tempo!“ Same kiel ni estas laŭ nia konscienco devigataj zorgi por nia propra ekzistenco kaj de nia familio, ni ankaŭ devas plenumi la de Dio donitajn taskojn pri publikaj aferoj. Tio signifas reprezenti la kristanajn principojn kiel komuna konsilano aŭ honora oficanto aŭ farante iun ajn oficialan taskon. Ĉiu devas almenaŭ plenumi sian elekt-devon favore al tiaj personoj, pri kies kristana honesteco oni konvinkigis. Se ni ĉiuj klopodas laŭ niaj fortoj kaj konoj, ni atingos veran ordon en nia ŝtata vivo kaj finfine en la interpopolaj rilatoj, sen timo pri nia estonteco, kiam la kristanismo vere penetros en la oficialan vivon.

Norvegujo. Dum la Olimpiaj Vintro-ludoj en Oslo la sportuloj havis okazon partopreni en kat. Diservoj. — Reĝo Olaf, la sanktulo kristanigis la landon. En tiu tempo ĉ. la jaro 1000 Norvegujo staris eklezie sub la ĉefepiskopo de Bremen-Hamburg (Germanio). Sed la floranta eklezia vivo fariĝis viktimo de la reformacio. Ekde ĉ. 100 jaroj ree estiĝis malgranda aro da katolikoj en Norvegio. Nun ekzistas inter la 3 milionoj da enloĝantoj ĉ. 3000 katolikoj. Iu kat. pastro havis dum multaj jaroj neniam katolikojn en sia loĝloko, kaj lia dommastrino estis la sola persono, kiu partoprenis je la s. meso. La sola kat. gazeto estas la “S-ta Olaf”, kiu aperas dusemajne. La disigitaj fideluloj devas vojaĝi 200-300 km, por atingi stacion kun Diservo. La granda Nobel-premiita poetino kaj verkistino Sigrid Unset per siaj romanoj pri la kat. mezepoka tempo, pleje atribuis por forigi la protestantajn antaŭjuĝojn.

Kardinalo Miĥael Faulhaber, nia altŝatata supera paŝtisto fariĝis je la 5-a de marto 83-jara. Dio donacis al li forlikecon en grand-aĝo. Ĉie, kie li aperas, venas infanoj kaj patrinoj kun la etuloj sur brako, por ke li metu sian manon sur ilin kaj faru la krucsignon sur iliajn fruntojn. Ni levu niajn korojn preĝante por li kun danko pro la plena gvidado.

Kio savos nian patrujon? Ni pensu al la liturgia teksto de la Cindra Merkredo: Ho, Dio, vi ne volas la morton de l' pekulo, sed lian pek-kompenson; malsuprenrigardu en gracoj sur la kadukecon de la homa naturo . . . verŝu indulge la gracon sur la kapojn de viaj servantoj . . . Vi donacis al la Niniveanoj, kiuj en sako kaj cindro pek-kompensis, pardonon kaj savon; igu, ke ni imitu ilian konduton, por ke ni atingu pardonon kiel ili.

Svisujo, modela lando de demokratio. Ekde jarcentoj Svislando praktikas tiun ŝtat-formon, kaj la homoj tie havas fortan, denaskan konscion pri libereco. Sed klare montriĝas la limo por ĉiu malorda libereco. Antaŭ nelonge la urba konsilantaro de Genf ordonis, ke ĉiuj reklamoj de kinejoj, teatroj, amuzejoj, magazenoj, ekspozicioj ktp. devas kun la teksto esti prijuĝataj de la tribunalo kaj polico. Se la bildo aŭ teksto kontraŭas la decon, konvenon aŭ bonmoralon, kaj se ili vekas malnoblajn instinktojn, aŭ se ili heroigas krimulojn, tiam la publikigo estos malpermesata. — Tio estas matureco de demokratio: Libereco sed ne senbrideco.

Tutmondaj sciigoj.

La mondkonataj S-ta Bernard-monaĥoj kun siaj grandegaj hundoj, kiuj en pli fruaj jaroj serĉis kaj savis la vojaĝantojn trans la Alpan monton sub la

neĝo, elmigris antaŭ 15 jaroj, ĉar ekzistas nun fervojoj kaj tuneloj. Ili iris al Tibet kaj konstruis hospitalon en la Himalaja-montaro, kie ili helpeme servis al la turistoj. Sed nun la enpenetrintaj komunistoj malpermesis al ili, plue alporti vivrimedojn kaj brul-materialon en la monaĥejon. Do la helpemaj monaĥoj ne plu povas noktigi kaj regali la vojaĝantojn kaj devis forlasi la hospitalon.

Vilaĝo famiĝas. La ekzilejo de la „kondiĉe“ liberigita ĉefepiskopo Stepinac de Zagreb estas nun la vojaĝ-celo de multaj vizitantoj kaj staras en la centro de la publika intereso. Venas diplomatoj kaj eksterlandaj gazet-reprezentantoj. La aŭtomobil-trafiko tiom pliiĝis, ke oni devis ripari la straton. Ankaŭ la poŝt-oficejo de Krasic ĝis nun prizorgata de unu oficisto, ne plu povas plenumi la ampleksan laboron, du plujaj oficistoj estis dungataj. Kompreneble tiu evoluo ne plaĉas al la ŝtatestro. La polico devas noti la nomojn de la vizitantoj. Al la ekzilita ĉefepiskopo oni ordonis, ne diskuti kun ĵurnalistoj pri politikaj demandoj kaj ne plu prediki en Krasic. La unuan ordonon la ĉefepiskopo volas obei, sed la duan li rifuzis.

La Katedralo S-ta Hedwig en Berlino ricevos novan kupolon antaŭ la ĉi-jara Katolika Kongreso (19.-24. aŭg.). Ĝi estu signo por la germanaj homoj en Oriento, ke ili malgraŭ la disigo ne estas forgesitaj. La Orient-Berlina magistrato disponigis por la rekonstruado de la katedralo 100 000 orient-markojn.

Patreca regado. Profunde impresis la mondon, kun kia kortuŝa kaj infaneca kunsento la angloj funebriis pri la morto de sia reĝo. Ĉi tie nek estis skismo, nek disonanco. Staris antaŭ la ĉerko registaro kaj opozicio, la alta nobelaro kaj la laboristoj unu apud la alia. Montriĝis la familia karaktero de l' angla popolo. Kvankam la reĝo de Anglujo preskaŭ nur funkciis kiel ŝtat-reprezentanto, oni tamen sentis patrecon en la ŝtato, ĉirkaŭata de multaj honorindaj tradicioj.

La ne-dezirata voĉo. Ne estas karnavala ŝerco, sed serioza plendo de kelkaj burĝoj en Detmold, ĉe la sanec-, ordec- kaj polic-oficejoj pri la sonorado de la preĝej-sonoriloj en nova kat. preĝejo. Je 6,30 h. la sonorilo vokas al la s. fru-meso kaj maltrankviligas la dormon de la urbanoj. Sed la juĝoj de la tri oficejoj konfirmis, ke ĝis nun ne estas konata la kazo, ke iu pro aŭdo de sonorado suferis difekton de la saneco.

Sankta Sidejo kaj Pakistano komunkonsente akordigis starigi inter si diplomatiajn rilatojn. Tiucele oni interkonsentis, ke Vatikano estu reprezentata en Pakistano per oficiala Internuncio, kaj Pakistano fondu Senditaron ĉe la Sankta Sidejo. Nun 43 ŝtatoj troviĝas reprezentataj ĉe la Vatikano. P. Emanuel, misiisto en Turkujo.

El letero de Leono Kaŭriĉ (81-jara malnova esperantisto, iama sekretario de la “Societo de la Kroataj Drakoj”). Tralegante belan artikolon en la februar-n-ro de “La Ĝusta Vojo” je memoro al la mortinta Princo Albert de Thurn-Taxis, mi volas aldoni: Ankaŭ en Jugoslavio, precipe en la respubliko Kroatio la princo posedis ampleksajn arbarojn kaj la historie faman urbeton Ozalj, iama proprajo de la kroataj magnataj grafoj Petro Zrinski kaj Krsto Frankopan, kiuj estis kondamnitaj kiel “ŝtatperfiduloj” en Vieno kaj ekzekutitaj en Wiener-Neustadt en la

jaro 1671. — En Kroatio ekzistis Societo de "La Fratoj de la Kroataj Drakoj", kiu laŭ siaj reguloj havis inter alie la taskon, subteni memoron je pasinteco de la kroata popolo kaj ĝiaj meritplenaj viroj. Pro tio la Societo sin turnis al la Princa Moŝto en Regensburg kun la petego, ke li bonvolu donaci la Kastelon Ozalj sur kruta roko super la rivero Kupa al la kroata popolo pere de la menciita Societo. Princo Alberto plenumis la peton kaj per donac-akto Regensburg en la jaro 1928 gentile donacis la kastelon al "Fratoj de la Kroataj Drakoj" kune kun la tuta ampleksa grundo. La Societo ĝoje festenis kaj telegrafe sendis al Princa Moŝto dankeman saluton kun peto, ke li bonvolu akcepti de la Societo la plej grandan honor-signon, kiun ĝi laŭ siaj reguloj povis doni, nome honoran anecon de la "Kroataj Drakoj". Tiun honoron la Princo afable akceptis kaj sendis longan telegramon kun bondeziroj al la nacio.

La lavang-katastrofoj similas al la pasintjaraj. Pro la granda neĝ-amaso la ĉas-bestoj, eĉ la ĉamoj venis ĝis la rando de la vilaĝoj. En aviadiloj estis transportataj fojno-faskoj al la kutimaj furaĝlokoj en la montaro. — Grandan bonŝancon havis la bavaraj sportuloj. Estis ĉ. 30000 skiantoj kaj rigardantoj maskitaj sur Firstalm. La blanka monto en sunbrilo kun la homa miks-amaso aspektis kiel formikejo. Laŭtparoliloj kaj 5 funk-stacioj ordis la trafikon. La plej belaj maskoj estis premiitaj. La unuan premion ricevis grupo de beduenoj, kiu kondukis kolosan kamelon sur skioj kun la surskribo "Unser Wehrbeitrag" — "Nia milit-atribuo". Rulegis granda lavango de la orienta deklivo en la Firstalmondvalon, 100 m for de la gaja popol-festo. Neniu estis trafita krom de ektimo. Honore al niaj skiantoj estu menciite, ke la granda kinejo en la Munĥena stacidomo, kiu frumatene estas ŝanĝita en preĝejo, estas plena de ski-sportuloj, kaj post ĉiu s. meso estas donata la vojaĝ-beno.

El la Esperanto-movado.

Radio Roma, Esperanto-fako. Via Veneto 56. E-dissendoj ĉiumerkrede kaj vendrede (Itala horo kaj mez-Eŭropa tempo) 18,30—18,50 h. Mallongaj ondoj 25,21=kc/s. 11.900; 31,35=kc/s. 9.570; 49.92=6.010 Programo por marto: 5. Italaj urboj: Cremona. 7. Respondoj al radio-aŭskultantoj. 12. Italaj komponistoj: Gerolamo Frescobaldi. 14. Pri la 29. kanto de la "Infero" de Dante. 19. Petrarca kaj lia kontraŭstarita amo. 21. Itala literaturo: Giovanni Boccaccio. 26. Programo por geknaboj: "PINOKJO" IV. sceno. 28. Pri la 30-a kanto de "Infero" de Dante.

Brazilo. La Esperanto-Asocio intencas konstrui en Rio-de-Janeiro propran presejon, gast- kaj unuigdomojn.

Japanujo. La Japana Esperanto-Instituto havas jam pli ol 2000 membrojn. Ekzistas E-grupoj en pli ol 30 universitatoj kaj en 50 superaj lernejoj.

Svedujo. La sveda registaro disponigis 4000 kronojn al la Esperanto-Instituto por ebligi la internacian kurson "La nuntempa Svedlando" de 27. VII.-2. VIII. 1952.

La 8-a Tut-Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Sidnejo 31. XII. 51-6. I. 52. La entuziasmaj partoprenintoj venis ŝipe, aere kaj aŭtomobile, kaj iu vojaĝis 4500 km por ĉeesti en la

kongreso. Grave estis, ke la raportistoj de maten-kaj vesper-ĵurnaloj, de dimanĉ-gazetoj kaj de brodkastaj kompanioj estis invititaj. Kun intereso ili rigardis la E-gazetojn kaj librojn. Aperis aro da artikoloj en la loka gazetaro kaj du disaŭdigoj. La telegrafa agentejo (Aŭstralian Associated Press) telegrafe distribuis novaĵojn kaj intervjuojn pri la kongreso al gazetoj tra la tuta kontinento. Okazis la unua E-Diservo en Sidneja kat. preĝejo. Pola kapucena monaĥo P. Sigismund, kiu antaŭ nelonge enmigris la landon, predikis esperantlingve; estis li, kiu en la koncentrejo Dachau organizis subteran E-grupon kun 14 anoj el subpremitaj nacioj. Tri novemmigrintoj el Germanio, Pollando kaj Bulgario ĝojis, ke ili trovis pere de Esperanto la unuajn amikojn en la fremda kontinento. — En la fakkunsido de la instruistoj oni decidis turni sin al la registaro de ĉiu ŝtato por instigi enkondukon de Esperanto en la lernejojn kun du-jara lern-programo. — La lastan tagon ĉiuj ekskursis al la famaj Bluaj Montaroj, kie ili ĝuis belan refreŝigon.

Afriko. Ankaŭ sur la Nigra Kontinento la E-movado ekfloras. En Marrakech (Maroko) okazas nedeviga instruo en lernejo post la klas-laboro. En alia E-kurso de la sama lernejo partoprenas i. a. du instruistinoj kaj Radio-inspektestro. Krom tio okazas publika E-kurso en liceo sekvata de 20 plenkreskuloj.

Instrua kaj rakonta parto.

Batalo kun gipaeto. Antaŭ multaj jaroj brava, lerta, juna ĉam-ĉasisto en Svislando travivis strangan aventuron. Iumatene li adiaŭis sian edzinon kaj unujaran fileton por ĉasi ĉamojn. Regule li bonŝance hejmenvenis kun peza ĉasaĵo. Akompanate de sia hundo li grimpis de rifo al rifo, sur danĝeriga vojo, kie ĉiumomente minacis pereoj kaj morto. Iom post iom amasiĝis malhelaj nubusoj super la tuta regiono. Oftaj fulmoj kaj foraj tondroj anoncis fortan uraganon. Malgraŭ tio li daŭrigis la penan grimpadon kun la al ĉasistoj specifa ĉas-avido. Fine li atingis longan rok-vandon, kie dekstre montriĝis krutega abismo kun ŝaŭmanta, murmuranta arbarrivereto en la profundo. Jen la ĉasisto ekvidis ĉe la rok-angulo vir-ĉamon ĉ. 50 paŝojn distance. Singarde li proksimiĝis al la danĝera angulo; apenaŭ li povis stari sur la dupied-larga grua rando deklivega al la abismo. Rigardo en la profundon dekstraflanke estis kap-turniga. Sed la penso, esti tiom proksime de la besto, forpelis la danĝeron el liaj okuloj. Singarde li pasis la danĝerplenan lokon, sed nun li subite haltis antaŭ pli terura, abrupta abismo. Eĉ se li mortpafus la virĉamon, ĝia havigo estus ne-eblo. Krom tio la besto flaris lin kaj anoncis per laŭta fajfo al siaj proksimaj kunuloj la minacantan danĝeron malaperante. Sin turni kaj reiri estis tute ne-eble. Kun plej granda singardo li devis kankre treti. Fortega ŝtormo furiozis, plimalheliĝis, tondris senĉese, pluvo fluis el la nubegoj. Li reatingis la angulon, sed ne plu povis teni sin pro la forta uragano. Li volis kuŝiĝi, sed ne estis tero, noktiĝis antaŭ liaj okuloj kaj kun la krio "Jezuo, Maria!" li falegis en la abismon. Estis tagmeze. — Kiam la suno subiris, li pro krampfa, akuta doloro ĉe la maldekstra brako vekigis el profunda sveno. Sed kia teruro! Preskaŭ denove li senkonsciigis, ĉar granda gipaeto firme kaptis lian maldekstran superan brakon kaj enkarnigis siajn ungegojn; per la alia piedo kaj flugiloj ĝi batis la fidelan hundon, kiu per

ĉiama bojado volis forpeli la rabbeston de sia sinjoro. Nun la ĉasisto rapide prenis la akran tranĉilon de el sia zono, trartrancis la pied-artikon kaj pikis ĝin plurfoje. La doloro subigis la rab-birdegon; tio plifaciligis al la fidela, fortika hundo la batalon. La ĉasisto leviĝis kaj tute mortigis la gipaeton. Li estis falinta sur amason da rul-sablo kaj suferis nur kontuzon je la dekstra piedo. La fortranĉitan ungegon li devis singarde eligi. La fidela hundo sciis trovi la valon, en kiun falegis ĝia sinjoro, kaj providence gvidata ĝi venis por savi lin antaŭ dolorplena, terurega morto. Tiufoje la ĉasisto hejmenportis gipaeton anstataŭ ĉamo, kaj ekde tiu tago li rezignis al la danĝerplena ĉam-ĉasado. La fidela hundo estis ŝatata kaj flegata de la familio ĝis sia fino.

Du arbar-knabinoj. Sur la japana insulo Kiuschu oni trovis en arbara kabano du sovaĝajn knabinojn, kiuj estis kreskintaj sen civilizo. Kuracisto, kiu vidis la tute nudajn knabinojn, diris, ke ilia vivmaniero nemulte diferencas de tiu de la bestoj. Ili sin nutras per plantaĵoj kaj radikoj. Oni taksas ilian aĝon je 15-17 jaroj. Korpe ili ne bone evoluas. La kurbaj kruroj certe devenas de la grimpado sur arboj. La hominoj interkompreniĝas per strangaj sonoj, kiuj iomete son-similas al la kutima dialekto en Kiuschu. Kiam oni provis vesti ilin, ili per la dentoj forŝiris ĉion de la korpo. Ĝis nun oni nenion scias pri la deveno de ambaŭ arbar-knabinoj.

Spritajoj. En vilaĝeto de la Majn-valo okazis kurioza historiĉeto. Gefianĉa paro volis geedziĝi. Jam ili staris antaŭ la pastro en la preĝejo, kiam oni rimarkis, ke estas ankoraŭ oficiala edziĝ-malhelpaĵo. La urbestro premis falsan stampon sur la ateston pri edziĝo. Dikaj ruĝaj literoj sur la ofica dokumento sciigis: "Stato: sana kaj sen trihinoj".

Kuracato al sia najbaro: „Kial vi ĉiufoje post la tag-manĝo streĉas vian horloĝon?“ „La kuracisto ordonis al mi malgrandan moviĝon post la tagmanĝo“.

Juĝo. Finfine la edukato konceptis. Feliĉe la privata instruisto ekspiris: Jen Joĉjo, se mi ne ekzistus, vi estus nun la plejgranda stultulo de l' mondo.

D I V E R S A J O .

37-a Universala Kongreso en Oslo. Aliĝis ĝis fino de januaro 687 ges-anoj el 26 landoj. La aliĝintoj nun ricevas la kongres-sciigojn el Oslo.

Aliaj religiaj societoj, sektoj kaj kristanaj eklezioj interesiĝas pri la Ĝusta Vojo kaj deziras interŝanĝi. Tio estas volonte plenumata, kvankam mi mem tute ne havas tempon legi la multajn sendaĵojn. Sed mi miris pri la bonie redaktata "Dia Regno" kaj la bele presitaj libretoj evangeliaj. Krome estas ree haveblaj kelkaj ekzempleroj de Nova Testamento, sed mi nur mendas por la Ĝ.V.-legantoj post antaŭa pago de ĉ. 3.- M.

Saarlando. La registaro de Saarlando sendis al la redakcio bele presitan broŝuron en Esperanto 20-paĝan: "Volo kaj vojo de Saarlando". Enestas paroladoj de la parlament-prezidanto kaj de la ministro-prezidanto en la 100-a kunsido 1951.

Jugoslavaj abonintoj en la pasinta jaro bonvolu repostuli sian pagon de s-ro Damjan Vahen-

Svetinov, Kapele apud Dobova, kaj doni la monon al s-ro Maruŝiĉ Marko, Zagreb, Crvene Armije 42.

Kristana gazetaro mankas en Germanio. Ekz. en Munĥeno ne plu ekzistas tagjurnalo kristana, nur "Bayerischer Kurier", kiu aperas semajne. Sed la vero bezonas voĉon, kaj la plej potenca voĉo en la granda publiko estas la gazetararo. La katolika gazetaro devas esti malkaŝa, kritika kaj interesa voj-montranto kaj gvidanto en la kontraŭ-bataloj de la opinioj. Ĝi plicertigu la juĝ-kapablon kaj akcelu la decidojn de la legantoj. La kat. gazetaro devas montri kiel seismografo ĉiujn malkonkordojn, ekskuojn kaj movadojn, kiuj minacas la Eklezion kaj la bonfarton de la homaro. — Multege mi cerbumis, kiamaniere oni povus fondi kat. gazeton en nia urbo, sed mankas fond-kapitalo.

Se la homoj ne pent-faras, venos ankoraŭ pli grandaj katastrofoj, subitaj alfluegoj, tertremoj kaj Ter-fendo. La nunaj okazaĵoj estas nur avertaj antaŭsignoj. La demonoj furiozas, kaj pli ol la duono de la homaro obeas al ili kaj ne plenumas la leĝojn de Dio. — Se aliaj volas imiti la tutnoktan, pek-kompensan preĝadon por savi la pekulojn, oni devas ankaŭ paŭzi dufoje, kaj ni eĉ iras unu post alia ĉirkaŭ la benkoj preĝante la rozariojn, por ne malvarmumiĝi.

El aerpoŝt-letero de Misiisto en Afriko. 1. III. 52. Tre estimata samideanino kaj karega bonfarantino! Mi ĵus ricevis la lastan numeron de via revuo kun via demando, ĉu mi ricevas regule la Ĝustan Vojon. Mi ĉiam ricevis ĝin kaj legis kaj relegis plezurege ĝin de la komenco ĝis la fino. Ĉi tie mi ankaŭ laboras por Esperanto, kaj nun mi havas 38 disĉiplojn, kiuj lernas nian karan lingvon. Ili deziras korespondadon eŭropan, kaj tial mi demandas vin, ĉu estos fareble komuniki tion per via revuo, kiam al vi plaĉos, fari tion. Adr. P. Felikso de Valois Arana (Katolika Misio) Santa Isabel-Fernando Poo, Afriko.

Ni preĝu por la bedaŭrindaj japanoj trafitaj de terura tertremo. Kelkcentoj da mort-viktimoj estas ankoraŭ ne precize nombreblaj. 9 m alta alfluego forĝargaris 500 domojn, la tero plurloke fendigis, ĉ. 2500 domoj el ligno kaj el ŝtono estas detruitaj. El la renversitaj karb-minejoj eliĝas fulmondoj el gaso kaj karba polvo. En la urbo Kushiŝiro, nun fumeganta rub-amaso, plorantaj virinoj serĉas edzojn kaj infanojn. —

En Rio de Janeiro (Brazilo) kunpuŝiĝis du trajnoj. La malsanul-veturiloj ne sufiĉis por fortransporti 200 lezitojn kaj 120 mortintojn.

Demono en virino. En Rejnlando estas Patro, kiu sin okupas pri obsedataj personoj. Lia nomo ne estu nun publikata. Ke ekzistas obsedatoj, pri tio mi mem konvinkiĝis, kvankam la gazetaro nur mokas pri eligo de diabloj. Ne ĉiu sacerdoto kapablas ekzorci kun sukceso. Tio estas tre malfacila anima fortostreĉo kun multa preĝado, oferado kaj fastado. Okazis, ke iu Patro devis ŝanĝi sian vestaĵon kaj tolaĵon pro troa ŝvitado en batalo kontraŭ la malbonulo. Foje, kiam la Patro klopodis eligi la demonon el iu virino, li petis kelkajn piajn personojn ĉeesti por subteni lin preĝante. Kaj li preskaŭ subigis la malbonan spiriton, jen tintis. Venis virino kun akra rigardo, la okuloj estis kvaŝaŭ el vitro. Li demandis ŝin, kion ŝi deziras . . .